## I.S.A.E. - ESTRARA RAPORTO PRI 1953.

**La Komitato** konsistis el sekvaj 12 personoj: Aŭstrujo: H. Sirk. Britujo: E. D. Durrant kaj A. A. M. Whitehead. Francujo: E. Francois kaj M. Fréchet. Germanujo: R. Haferkorn. Japanujo: S. Nishi. Jugoslavio: B. Popovič. Nederlando: G. Hamming kaj G. F. Makkink. Norvegujo: C. Støp—Bowitz. Svedujo: S. Alexandersson. Redaktoro de Scienca Revuo: W. P. Roelofs. Delegito pri informado: I. Lapenna.

### SPEZOJ 1953.

| Enspezoj | sv.kr. | Elspezoj | sv.kr. |
|---|---|---|---|
| Saldo el 1952 | 74.04 | Muusses | 1767.50 |
| Belgujo | 22.78 | Afranko | 166.40 |
| Britujo | 62.35 | Papero | 154.90 |
| Finnlando | 79.11 | Libroj | 1.75 |
| Francujo | 900.00 | Kotizo al UEA | 14.50 |
| Germanujo | 351.88 | Subteno al germana sekcio | 61.50 |
| Italujo | 85.00 | Saldo al 1954 | 236.69 |
| Jugoslavio | 346.00 | | |
| Meksikio | 22.32 | | |
| Nederlando | 38.00 | | |
| Norvegujo | 97.62 | | |
| Svedujo | 147.50 | | |
| UEA | 11.40 | | |
| Urugvajo | 13.80 | | |
| Usono | 83.75 | | |
| EANA, Usono | 67.69 | | |
| Sume sv.kr. | 2403.24 | Sume sv.kr. | 2403.24 |

### BILANCO 31.12.1953.

| Bonhavoj | sv.kr. | | Ŝuldoj | sv.kr. | |
|---|---|---|---|---|---|
| Kaso | 236.69 | | Brazilo | 4.80 | 17 kru. |
| Argentino | 12.20 | 32 pes. | Britujo | 2.90 | 4 ŝil. |
| Aŭstrujo | 38.30 | 159.70 ŝil. | Finnlando | 1.70 | 76 mk. |
| Bulgarujo | 25.40 | 1410 lev. | Japanujo | 50.00 | 3440 jen |
| Ĉehoslovakio | 243.00 | 2360 kr. | Jugoslavio | 156.00 | 8970 din. |
| Danujo | 122.00 | 162.10 kr. | Meksikio | 12.00 | 19.50 pes. |
| Francujo | 335.00 | 22803 fr. | Muusses | 850.00 | 632.19 guld. |
| Hispanujo | 192.00 | 1480 pes. | Polujo | 44.50 | 34.50 zl. |
| Italujo | 16.00 | 1920 lir. | Svedujo | 43.60 | 43.60 kr. |
| Nederlando | 40.00 | 29.50 guld. | Usono | 8.20 | 1.60 dol. |
| EANA, Usono | 8.20 | 1.60 dol. | Kapitalo | 95.09 | |
| Sume sv.kr. | 1268.79 | | Sume sv.kr. | 1268.79 | |



La Estraro konsistis el: Prezidanto M. Fréchet, vicprezidantoj C. Støp—Bowitz kaj G. F. Makkink, ĝenerala sekretario E. D. Durrant, sekretario-kasisto S. Alexandersson. Anstataŭantoj estis H. Sirk kaj M. J. de Lange, revizoroj K. Young kaj A. A. M. Whitehead.

**Delegitoj.** Je la fino de la jaro ISAE havis delegitojn en 17 landoj kaj perantojn en 2 landoj.

**Membraro.** Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstrujo 37, Belgujo 3, Brazilo 6, Britujo 78, Finnlando 15, Francujo 63, Germanujo 38, Gvatemalo 2, Hispanujo 13, Italujo 8, Izraelo 1, Japanujo 22, Jugoslavio 13, Maroko 2, Meksikio 3, Nederlando 57, Norvegujo 13, Svedujo 12, Svisujo 1, Urugvajo 2, Usono 16, sume 408 en 23 landoj.

**Landaj societoj,** kolektive aliĝintaj al ISAE, ekzistis en 3 landoj: Britujo, Francujo, Nederlando.

**La sekretariejo** estis prizorgata de la sekretario-kasisto. Dum la jaro ĝi ricevis 185 kaj sendis 183 leterojn. Krome ĝi sendis 4 cirkulerojn al delegitoj kaj komitatanoj.

**La kongresa kunveno** okazis la 28 kaj 29 julio en Zagreb, Jugoslavio, sub prezido de la jugoslava delegito prof. B. Popovič.

**Scienca Revuo,** la oficiala organo de ISAE, aperis per duobla numero 1-2. Redaktoro estis d-ro W. P. Roelofs kaj eldonanto s-ro J. Muusses, Nederlando.

**Terminologia Sekcio** estas fondita kaj funkcias de la 1.1.1953 sub la portempa gvidado de la sekretario-kasisto. Ĝi elsendis unu cirkuleron. La sveda sekcio eldonis terminarojn en la fakoj elektrotekniko kaj ornitologio. La germana sekcio laboris pri Scienca kaj Teknika Terminaro. S-ro C. Støp—Bowitz, Norvegujo, laboris pri zoologia terminaro. Ankaŭ en Britujo, Francujo kaj Italujo la terminologia laboro estis vigla.

La Estraro.

***

= 089.2 = 061.239(100) : {001.8 + 002}

**Eldonado de la dokumentoj de CED.**

La Komitato de UEA sugestas, ke landaj kaj fakaj asocioj, redaktoroj de gazetoj, lokaj grupoj, k.t.p. abonu la esperantlingvajn dokumentojn, kiuj ĝis nun ne povis aperi pro tro malgranda nombro de abonoj. La Komitato opinias, ke la dokumenta materialo estas bonega bazo de diskuto en Esperantistaj rondoj kaj ke ĝi povos provizi la Esperantistojn, kiuj ofte tro malmulte konas sian propran aferon, per plej trafaj argumentoj, uzeblaj en diskutoj kun kontraŭuloj.

**Neesperantistaj internaciaj kongresoj.**

La Komitato de UEA rekomendas, ke la Landaj kaj Fakaj Asocioj faru plej ampleksajn klopodojn por instigi la partoprenon de fakuloj Esperanto-parolantaj al neesperantistaj internaciaj kongresoj.

C. C. Goldsmith.